



La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj. Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham.

Specimena numero—unu respondkupono aŭ 30 c. U.E.A. kupono.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 122 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. 10 Aŭgusto 1930.

THE WORLD—AS ARRANGED BY EDITORS.

The "Sunday Express" (London) recently published an extraordinary article under the title, "The World Will Soon Speak Nothing But English," by Mr. James Douglas. With editors and newspaper proprietors trying to rule the world, as they are nowadays, we are not certain whether to read this in the indicative or the imperative mood.

Mr. Douglas tells us that English is "destined to become the universal language of mankind" and that "no other language has a chance of becoming the international language of the human race." Further, that "one day the world will be one, and all men will speak and write English as they speak and write their mother tongue" (which we may point out in passing, is in many cases rather badly). Mr. Douglas seems a little uncertain whether English is to become "universal" or merely "international"; but we may leave that point to him. He trips up badly in another statement, to the effect that "all attempts to invent an artificial language have failed." He asserts that "there is no future for Volapuk or Esperanto or any other concocted form of international speech"—so that, although a newspaper editor, he is evidently one of the people who have remained in the dark as regards the progress of Esperanto. Let us hope that he will go to the Oxford Congress in August and judge for himself. But in the meantime, perhaps he will enlighten us as to the justification for another of his statements, that "wherever you travel in foreign lands you find English spoken, written and understood. You can go anywhere on English and English alone." He might also tell us why, in that case, there is such a large market for foreign phrase books; why it is

that so many foreigners persist in writing letters to English correspondents in French and other alien tongues; why they so often seem to forget their English directly they land in England; why the people of Quebec, British though it be, still speak French; why the League of Nations allows French as well as English as an official language for its debates; and why at ordinary international congresses there are two or three further official languages. Again he tells us that "no other language has the power to grow as English grows. The other languages are regionally rigid and frigid." We can only say that this is not our experience with foreign tongues, which appear to assimilate, with surprising ease, new words in such quantities as to be most embarrassing to those of us who learnt one or another of them some years ago. We do not know what our foreign friends would like to say to Mr. Douglas on this point—but we are quite certain that they would repudiate his claims for English, and the idea that it is going to kill their own languages as he suggests.

We fear that in most of Mr. Douglas's dogmatic statements "the wish is father to the thought"!

("International Language.")

ELECTRO-TECHNICAL INSTITUTE accepts Esperanto.

The famous Electro-technical inst. of the University of Grenoble (France) has decided to use Esperanto in its widespread foreign advertising.

We have to hand from them a finely printed folio in Esp., giving an outline of the multifarious organisation of this many-sectioned seat of learning.

Turn to Direktoro de Politeknika Inst., 46, avenue Felix-Viallet, Grenoble, France.

CHE - INSTITUTE OF ESPERANTO Founded in The Hague.

"Heroldo de Esperanto" announce a very important step in the Esperanto movement, the founding of an institute for the large-scale diffusion of Esperanto throughout the world by means of courses conducted by instructors trained in the methods of the young Rumanian pedagogue whose dazzling successes in Sweden and Holland have sent thrills of coming victory through every Esperantist.

The disciples of Andreo Che have practised and are practising his methods with success equal to their Master's. For the last two years large courses have finished with the pupils sincerely regretting the close of the tuition given by such as MM. Seppik, Moriariu or Mdme. Pahl. These highly encouraging results have served to banish from the mind of Pastor Che the depressing thought enplanted there by what he modestly deemed to be fulsome flattery, that the success of his teaching methods was to be explained by his personality alone.

The scene of this move, fraught with so much significance for the Esperanto world, and, indeed, we hope for the world in general, was the hotel De Twee Steden (The Two Towns) in Den Haag, where on 24 May the public inauguration of the Che-Institute took place, before the assembled representatives of the Press and an interested public. Many influential citizens attended by invitation.

The Institute will train a constant stream of Esperanto teachers on an international scale, and serve as a central office for the direction and regulation of the newly-made armies of Esperantists.

A call is made for monetary support. Foundation life members are accepted on payment of £40; supporting life members, £8; active members are those who devote themselves to labor for the Institute, and pay only an entry fee of 10/- to Julia Isbrucker, Oostduinlaan 32, The Hague.

NORTH AMERICAN ESPERANTO ALMANAC.

Here is our American friends' first year-book, happy augury of increased activity and forward drive on the part of the Yankee and Canuck Esperantistaro. Mr. J. Sussmuth edited it, and packed in the 112 pages a wealth of informative matter for English-speaking Zamenhofans. Dr. Lehman Wendell's fine article, "What is Esperanto,"

covers a lot of ground concisely. Then there's an outline of the activities and organisation of Esp. Ass. of Nth. America, a chapter on the Esp. World Movement, an explanation of what the Sennacieca Asocio Tutmonda stands for, Twenty-five Methods of Esp. Propaganda, each good, a full list of names and addresses of E.A.N.A. members, and so on.

Paper is fine-quality, but press errors jolt the eye here and there, even in big ads. Turn to The Esp. Ass. of Nth. America, Fort Lee, N.J., U.S.A.

LUNA LUMO. (Claire de Lune"; de Paul Verlaine.)

La blanka lun'
en bosko lumas;
sub ĉiu branĉ'
ia voĉo zumas
el foliaro....
Ho, koramato!
En lago rebrilas
(profunda spegul')
la nigra konturo
de l' nigra salik',
kie ploras la vento...
Ni revu: jen tempo.
Ia vasta kaj dolĉa
pacema sent'
nun ŝajnas flui
de l' firmament'
per astroj iriza...
Jen hor' Paradiza.

—Tradukis A. Delsudo.

Iriza: kiu vidigas kolorojn kiel tiujn de ĉielarko: iriza perlamoto, iriza kvarco.

ABBREVIATIONS.

For the benefit of those to whom the frequently recurring contractions and abbreviations in the European Esp. papers give trouble, we publish the following suggestive rather than complete collection of the commonest.

I.a. inter aliaj; k.a. kaj aliaj; k.c. kaj ceteraj; t.e. tio estas; k.s. kaj similaj; anst., anstataŭ; ekz., ekzemple; k. sekv., kaj sekvantaj; rim., rimarko vd., vidu; kp., komparu; Rusl., Ruslando; el- kaj eniri, eliri kaj eniri. k.d. kaj diversaj; k.t.p. kaj tiel plu; ĉ. ĉirkaŭ; div. diversaj; k.m.a. kaj multaj aliaj; p. personoj; lern. lernantoj. In Russian gazettes one often meets such clipped compounds as "profunio" (profesia unio, unuigo); komjunularo (komunista junularo); "labrondo" (laborista rondo). These forms are no hindrance to the regular readers of such publications, as on their first appearing in the text they are accompanied by an explanation. The constant

need to express these objects or ideas, and the desire to save time and space in setting, prompt the use of these truncated roots.

TRANSLATING A HARSH EXPRESSION.

Do the English words "dam, damned, damnable, damning," call for the introduction into Esperanto of the root "damn" (L. *damnare*)? The root is found in French (*damner*), Ital. (*dannare*), Port. (*damnar*), and Ger. (*verdammten*), and has been availed of by several writers, including Grabowski. Baghy, Kalocsay, "Egruho" (translator of "La Sipĉarpentisto") and the translators of "All Quiet." But its use by translators on every occurrence of the root in an English text is not warranted. Perhaps these innovators have felt that the root "kondamn" expresses primarily the sense of moral reprobation, or the legal idea resident in the verb "to sentence" (a prisoner), while the forcible injunction "eniru inferon!" often carries with it a note of defiance to be distinguished from the anger or bad temper that generally prompts the imperative use of the verb "damn." The following sentences may provoke thought. "That traffic is a damnable one" (*Tiu fikomerco estas diabla*). The curse can be rendered, "Estu kondamnita" (*Venecia Komercesto 76/1*). "The evidence against him is damning" (*La atesto plene pravas lin kulpa*). The loose expression "It's a damned shame!" means little more than "Maljustege!", "Maljusta afero!". Here are a few examples from Zamenhof. "La diablo ĝin prenu." *G. Dandin 9/13* (Damn it; Devil take it). "La diablo ĉion prenu." *Revizoro 61/6*. (Damn it all). "Estu malbenita; malbenita vi estu; malbeno al vi. (Damn (curse) you). *Rab. 36/4, 19/12, 49/16*. "Al la diablo; kio, al la diablo (Damn it. Devil take it) *Rab. 49/10, 81/1; Batalo de l' Vivo 9/4*. "Beata" is seen now and then in the work of good authors, used in relation to the saints—"la beata Virgulino," "la beataj apostoloj." Would not "malbeataj" mean "the damned"? (*Robo.*)

Hindujo kaj la angla lingvo.

La kvalito de la angla lingvo parolata de universitataj diplomitoj en Hindujo estas multe malpli bona ol ĝi estis antaŭ 20 jaroj. Tiame angloj instruis la lingvon, sed nuntempe tion faras hindoj, kiuj mem uzas ĝin nur nelerte. (S-ro Wilbur Koblinger, usona konsulo en Aŭst.)

QUERY CORNER.

B. in Tom. Place of adverb. (Cox 88, 59a) "Estas vere necese." It is really necessary. "Estas necese vere." It is necessarily true.

Bop. in H. Atendi, to await (with expectation, or certainty, or hope). One cannot translate by "atendi" every signification of the Eng. "expect." For ex., "Mi ricevis ordonon atendi lin ĉi tie, sed mi pensas (aŭ opinias), ke li ne venos" (I don't expect him). "Mi atendas la alvenon de la vagonaro", but "Mi ne antaŭsentis (aŭ antaŭvidis) tian skuon." I didn't expect such a shock (or shaking). "Ekspekti" seems quite unnecessary. Every meaning of "expect" is translatable by means of our present provision of word material.

Ilisto en Y. Don't use -ul with participle nouns. Write "ŝanĝito," "kap-tito."

F. in Kor. Yes. "It seems to me quite possible—probable even—that an artificial language to be universally used will be agreed upon." (Herbert Spencer, "An Autobiography," 1843).

Deko in L. There are two Esperanto lesson-books in Icelandic, published 1906 and 1909.

Germ. in D. "Ekzakta" is now an "official" word. But compare "La Rabistoj" p. 37/29: Oni ja alkondukis la pretigadon de venenoj preskaŭ al la rango de bonorda scienco (exact science).

No All. "Plaŭdi per la manoj," to clap the hands (not always to applaud!); "plaŭdi," to give out a sound as of water when beaten by the hand, an oar, etc. "Aplaŭdi," to clap the hands in applause; (fig.) to express approval.

ESPERANTO KAJ ROMKATOLIKOJ.

Ni ricevis de Budapeŝt 62, Postaŭfiko 203, belan kongreso-murreklamon kaj broŝureton pri sankta Emeriko, filo de sankta Stefano, kiu fondis la sanktan kronon de Hungarujo. Sta. Emeriko estas patrono de la hungara junularo, kiu ĝojos akcepti aŭguste nunjara la romkatolikan junularon tutmondan, por festi kun ĝi la memoron de sia granda patrono. La 15a Katolika Kongreso okazos 16/20an de aŭgusto, kaj en la solena procesio sur la Danubo veturos inter la ŝipoj de ĉiuj nacioj, ankaŭ la ŝipo de la Esperantistoj.

OKSFORDA KONGRESO KAJ LA KABLOSERVO.

Brave! Ĉu por la unua fojo aperas ĉefpaĝe kablitaj novaĵoj pri Esp. mondkongreso? Pictorial World Cables servis al la melburna "Sun," granda tagĵurnalo, dekseplinian raporton pri okazonta kongreso Esp-a ĉe Oksfordo. Sub rubriko "Ĉi tie neniu Babelo—Esperanto. Delegitoj el 40 landoj parolas unu lingvon," la kablisto informis pri alveno de sep aŭstralianoj en Londonon, envoje al Oksfordo, kaj trafte kontrastigis la lacigan procedon ĉe la interparlamentara konferenco kun la facila irado ĉe Esperanto-kongresoj. Gratulon al tiuj instigintaj la kabloservon, tiel bone kaj juste informi la mondon pri jam grava afero.

OUR TENTH BIRTHDAY.

To those who sent us congratulations on having seen a decade through, we express thanks and heartily reciprocate the warmth of encouragement shown. Specially do we appreciate the kind letter sent by the members of the Melbourne Esperanto Society, who assured us of their keen interest in the welfare of the S.K., and hoped to see it loyally supported by every E. club in Australasia.

FINNA TRADUKO DE ESPERANTA LIBRO.

Ankoraŭ unu Esperanta verko reaperis en nacilingva traduko. La konata verko de niaj samideanoj sinjoroj Lauri Laiho kaj Antoni Delsudo (Maurice Hyde), "Aŭstralio: Lando kaj Popolo," eldonita antaŭ du-tri jaroj en Leipzig, estas tradukita en Finnan lingvon de sinjoro Laiho kaj eldonita en Porvoo de la firmo Werner Soderstrom.

La ekstera aspekto de la libro estas tre simila al tiu de la Esperanta eldono, frapanta kun sia ruĝa koloro, blankaj steloj de la suda kruco kaj karakterizaj bildoj de la Aŭstria vivo. Noto sur la unua paĝo klarigas, ke la verko estas traduko el Esperanta originalo.

Ne estas bezone, insisti pri la grava signifo de tia apero. La fakto, ke en Esperanto aperas verkoj sufiĉe gravaj por meriti tradukon en nacian lingvon, estas pruvo pri la serioza valoro de nia lingvo. Kiel Aŭstralianoj, ankaŭ, ni povas ĝoji pri la dissemado de fidindaj kaj freŝaj informoj pri nia malmulte konata lando.

Ni gratulas al niaj samideanoj Laiho kaj Hyde pri ĉi tiu nova sukceso, kaj esperas, ke pluaj tradukoj en aliajn lingvojn baldaŭ sekvos.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

El la redakcia koro flugis dankosago, kiam alvenis ĉiu abonajo aŭ donaco ĉi tie kvitancata. Al la fideluloj la S.K. esprimas sian altan ŝaton.

S-ino A. Carter, 4/6, majo, '31; G. Jelas, 5/-, julio, '31; J. Sneddon, 5/-, julio, '31; per vendo, 3/8; M. Ravelich, 5/-, majo, '31; kolektita de s-ro M. Ravelich, 25/-; f-ino H. Dawes, 4/6, julio, '31; G. Gordon, 5/-, junio, '31; J. Hodges, 5/-, junio, '31; per s-ino Sainsbury vendo, 5/-; pastro A. Lambton, 4/6, julio, '31; f-ino H. Batchelor, 5/-, junio, '31; f-ino E. Chisholm, 4/6, aprilo, '31; f-ino G. Marshall, 4/6, junio, '31; f-ino A. Hopton, 4/6, junio, '31; C. Dornbusch, 5/-, julio, '31; J. Dobrich, 5/-, aŭg., '31.

KURSO PER TRADUKADO.

(kondukata de s-ro George Gordon, F.B.E.A.; sekretariino, f-ino B. Blyth, 10 Victoria-av., Surrey Hills, Melbourne, E.10.)

TRADUKO 9

LA AŬSTRALIA INDIGENO

(daŭrigata)

Ankaŭ erara estas (1) la tre ofta diro, ke la viroj, forirante la kamploĝejon, igas la virinojn marŝi post ili kaj porti ĉiujn pezajn ŝarĝojn. Vere estas, ke la viroj ordinare iras antaŭe, portante nur siajn lancojn, lancĵetilojn kaj ŝildojn, sed ili tion faras simple pro tio, ke ili devas esti ĉiam pretaj por ĉasi kangurojn (2), dromajojn (2) kaj aliajn ĉasulojn, de kiuj la familioj dependas por nutro. Por tion sukcese fari, estas necese, ke ili ŝtelire proksimiĝu al la ĉasato (3), kaj la bruado ordinare farata de granda aro de indigenoj fortimigas bestojn. Ofte la viroj ja portas tiel pezan ŝarĝon, kiel la virinoj krom tio (4), ke virino ordinare portas junan infanon, se ŝi tian (5) havas, kaj tia kutimo ja ne estas stranga eĉ ĉe blankuloj.

Sir Baldwin ankaŭ celas forigi ankoraŭ unu (6) eraron nome, ke la indigena infaneto estas mizera, nesufiĉe nutrata kaj senespera. Li diras, ke, se sezono estas bona kun abundo da manĝaĵo kaj akvo, la juna Aŭstria sovaĝulo havas neniel malfeliĉan infanetecon. Ĉirkaŭrampante kvarpiedule ĝi estas la centro de intereso por la plenaĝuloj ĝuste tiel, kiel estas blankula infaneto samaĝa. La indigeno ja estas tiel amema kaj milda al siaj infanoj, kiel estas blankula patro aŭ patrino (7) al siaj. Sir Baldwin diras:—Ĉe ĉiuj triboj, kun kiuj mi intime rilatis, certe ne estas bezono por "Societo por malhelpi Kruelecon al Infanoj."

Aparte (8) interesaj estas iuj komentarioj pri rilatoj inter la blankaj kolonioj kaj la landidoj. Li diras:—En la fruaj jaroj de la koloniado la tipa blankulo en Aŭstralio, precipe (8) en la malproksima internolando—kvankam felice ekzistis multaj esceptoj—opiniis tre malfavore pri la nigruloj, kiujn ordinare li ne, eĉ la plej malmulte, penis kompreni. Kiam la blankulo venis, okupis la landon kaj paŝtis sur ĝi brutarojn, li tre nature mortpafis la dromajojn kaj kanguruojn, kiujn manĝadis la indiĝenoj. Ankaŭ nature la nigrulo pensis, ke, ĉar la blankulo mortigas kanguruojn, la indiĝeno rajtas (9) mortigi bovojn. La afero laŭ sia vidpunkto estis nur pagopreno. Malfeliĉe la blankulo posedis fusilon (2) kaj la indiĝeno nur lancon kaj bumerangon (2); kaj ĉar la nigrulo ne povis skribi al la gazetoj por meti sian plendon antaŭ la publikon, kaj ĉar, kompreneble, li ne povis pli ĝuste distingi inter tia kaj alia (10) blankulo, ol povis blankulo distingi inter tia kaj alia (10) nigrulo, li simple konsideris ĉiujn blankulojn malamikoj, kaj siamaniere faris laŭpove por revenĝi kaj por gardi sin, siajn virinojn kaj infanojn. Eksterdube estas, ke, kiam okazo favoris lin, la nigrulo iufoje faris tion, kio, laŭ la vidpunkto de la blankulo, estis supermezure abomena, tamen la abomenaĵoj, kiujn faris la nigruloj, estis kvazaŭ nenio en komparo kun tiuj de la blankuloj.—(daŭrigota).

NOTARO 9.

1. En la Angla teksto la subjekto ("description") de la frazo estas malproksime de la rilatanta verbo ("is"). Estas bonstile konstrui la Esperantan frazon tiamaniere, ke la subjekto kaj la verbo estu proksime al si.—2. Vorto de Verax.—3. Substantiva participo. Cox 210.—4. "save" (except). Ne uzu "escepte" sed "esceptinte" aŭ "krom tio," ĉar "escepte" signifas "exceptionally" aŭ "as an exception." Mill.—5. "one" ĉi tie en la Angla estas pronomo. Komparu "Mi ne estas haringo! kaj ĉar mi ne estas tia (one) estas do afero tute simpla." (Marta 52/7), kaj "Se mi estus tio (one)." Rab. 81/11.—6. "ankoraŭ unu," another, one more, yet another. Oni ankaŭ povus uzi "plua." Notu, ke "alia" signifas "another" (not the same)—7. Esperanto ne havas vorton por "parent," sed "parents" estas gepatroj. — 8. "especially," "particularly." En tiu senco ne uzu "speciale," kiu ĉiam enhavas la ideon de celo, intenco aŭ destino. Ekz. 19/7.—9. "rajtas" ne "rajtis." Cox 220, 221.—10. "tia kaj alia," this and that. Komparu

F.K. 292/29, Ham. 58/26, Bat. de l'Vivo 68/28.

EN OKCIDENTO NENIO NOVA.

Dolorkrio de la simpla soldato.

Tradukita de s-roj Teo Jung, Jos. Berger, W. Hoffmann kaj d-ro Hans Ellinger.

Eldonita de "Heroldo de Esperanto. Prezo, kartonite kvin, tole bindita sep ŝilingoj.

"Terura libro pri terura afero," nomis ĝin iu angla publicisto. Tiu kerneco ne sufiĉas. Teruranta ja ĝi estas....sed ankoraŭ pli. Ie kaj ie la aŭtoro helkolore pentras tiujn naŭze hontigajn scenojn generitajn de la bestfaranta spirit-haladzo de l' organizita hombuĉado; sed ankaŭ mult-multon, kiu gloron priadias sur la vole-nevole ĝin partoprenantaj. El koro flamanta flagre eliras ĉi tiu denuncio al la sanga frenezo de l' nacioj. El koro homeca elvenas plenkonstruite purblanka monumento al la kamaradeco, la amo ferliga inter tiuj frontantaj la fajrosputojn el la Infero. Jen krudigitaj homtigroj vadas tra sanga koto, pri kiu ili fi-ŝercas; jen la samaj riskas la vivon sub hajlopafado, alportante savon al amiko trafita. Realisme sincera elverŝo de bildoj, pentritaj de inkub-regata animo; neforviŝeblaj skizoj de tiu plejbela floro de l' militjaroj—oferama kamaradeco.

Lingveroj de la aŭtoro, Erich Remarque, al multaj iugrade ofendas. La sentemaj legantoj ŝokiĝas sajne pro neplena aŭ tutnen-ia scio pri la vomiga vero, kion la homa esprimpovo, ne troigante, pene celas priskribi. Plue, povas esti ia hipokriteco en tio, ke la ofenditoj, kvankam ili scias la concernajn faktojn, tamen la vortojn ĉastule ŝajnigas eviti. Tiuj uloj preferas fermi la okulojn kontraŭ la malhomigaj flankoj de l' afero, kaj samtempe babilu banalaĵojn pri naci-gloro, soldata bonhumoro, elporteco ktp.

Cetere, modereco markas la verkon de la tradukinta kvaroj. La diskutitaj paragrafoj estas lerte manovritaj en sian novan lingveston per plumoj jam nun donintaj al la mondo entute glatlegeblan respegulon de la originalo.

Ankoraŭ venas verkatakoj de la romantika skolo literatura, kaj de certaj profesie militistaj rondo. Iu armeoficira asocio en Germanujo akuzis la aŭtoron, riproĉante, ke li kalumnias la sialandan soldataron. Devas esti, ke la koleraj militistoj-sinjoroj aŭ ignore tralegis aŭ malĝuste komprenis la verkon. Remarque mem respondu: "Ni ne estas venkitaj, ĉar kiel soldatoj ni estas pli taŭgaj kaj pli spertaj; ni estas

simple dispremitaj kaj returnŝovitaj de la multobla pliforto." Vere, li montras angore sur la malfortikiĝon kaj finan kolapson de la germana rezistovo, kaŭzitan de la mortlaco, korpkonsumiĝo kaj malespero. Jam la malamikaro superege disponas amasojn da armitoj kaj montojn da materialo—kaj "niaj freŝaj taĉmentoj estas anemiaj kaj kadukaj knaboj, kiuj... facile mortas."

Se Remarque iamaniere deprenas de la sialanda armeo ian por ĝi rajtan honoron, tion ankaŭ faras por la sia la dramaŭtoro Sheriff, per "Journey's End" (La fino de l'vojaĝo), en kiu li prezentas la timon de du anglaj oficiroj antaŭ la militinkubo.

Ĉu ne pliĝuste dirite, ke tiaj verkistoj malligas la langon al la mutaj amasoj da siaj dolorantaj samsortanoj, povigante ilin vortigi sian kŝirantan demandon al ĉielo, "Kial?"

Por ke la libro aperu ĝis la nasktago de l' amita Zamenhof, kvar kompetentuloj entreprenis la tradukon. Pro ĝusta stil-unuecigo ne estas eble, trovi kie komencas aŭ finas la malsamaj plumoj.

Oni bezonus almenaŭ du kolumnojn de tiu ĉi gazeto por oportune pritrakti la lingvan flankon de la traduko. Menciataj estu nur plej atentindaj neologismoj: apelo, lazareto (kvarantenejo), dizerti, rami, ego, rodi, stafedo (stafeto, Verax), pufro (A. puff, malpeza kukajo?), piero (pontkolono), depoto, simuli. La tradukintoj ne tre zorge evitis duobligi konsonantojn. Kelkloke "ĵus" misuziĝas. "Propradire" sonas strange (verdire, ĝustadire) Sesfoje nebona elaso de la pronomo; (ili) estas anglaj ŝuoj. Prezantante (proponante) cigaredon. Neĝuste "ne jam" (ankoraŭ ne). Kio signifas "Na"? Intermiksita (a) 40/3. 149/2 ord(ig)i, 42/13 ekzerci (sin). La kunmetoj kun "fajro" estas ne ĉiam klaraj. Ekz. 58/12 "fajroatako." Provi (ĉu ne "peni"?). Stranga uzo de "opini" 60/28 k.a. kie oni devus traduki per "volas diri." "Ĉasistoj" (chasseurs, jaegers). Neklara paraĝrafo sur p. 71. 75/6 eltrumpetas. 87/22 drink' (trink'). 89/1 minĵetilo (bomb-?). 112/8 tiel ke (tial). 152/16

nome (nominale); piedumoj, 124/22 (vindgamaŝoj). 113/17, 144/23, pozicia batalo (A. trench-warfare) kaj "proksimbatalo". 143/18, 188/3 (ĉemana batalo?) ne klaraj. 239/16 "spirale ruĝaj"? "ŝildoj" (A. sentries !); vertico (limo, silueta rando?). ĵursimile (riproĉe), radikale (doloregige), unuarange celita (bontrafe c.). Loke en la pli meditecaj partoj la penso nebuliĝas ĉe la leganto, kaj certaj radikoj uziĝas en maniero iom por ni novaj.

La libro abundas je teknikaj militesperimaj kaj terminoj soldatfakaj. La Esp-istaro kelkajn akceptos en la komunan lingvon, aliajn sugestiajn sed ne sufiĉe precizajn aŭ klarsignifajn ili elekteme adaptos polurante, aŭ rifuzos eniron por simpla neuzo.—(Robo.)

Wear a Star !

It seems a matter for regret that so many Esperantists and partisans of Esperanto through indifference or timidity wear no green star. A pretty little brooch or stud can be bought for 1/6d. through your club, and forms an inexhaustable font of opportunity for presenting our language to enquirers. "Vir-samideanoj" should take the precaution to sew their stud-star in the lapel, otherwise it may fall out. To those who, while enthusiastic in furthering Esperanto, yet speak it with difficulty, we counsel that they learn some half-dozen key phrases very well, in order to direct foreigners to the club, or to the address of an Esperantist able to meet the position. But always wear the star !

VIZITO DE F-INO E. A. SINNOTTE AL JAPANUJO.

F-ino E. A. Sinnotte, aŭstralia samideanino kaj aŭtorino de la originala novelo „Lilio“, vizitis japanujon, la 27-an de marto. Ŝia vizito estis ĝustatempa por admiri la belajn kaj mond-famajn ĉerizflorojn.

Alveninte al Kioto, ŝi demandis al la direktoro de la hotelo. Ĉu li konas iun Esp-iston en la urbo, kaj tiun vesperon vizitis ŝin kelkaj samideanoj. La sekvantan tagon ili gvidis ŝin tra la

PERCY HOLMES ELEKTRISTO KAJ RADIISTO. 212 NOONE-STR., CLIFTON HILL.

Prezentas al vi novan radi-aparaton. La "VERDASTELO" maŝino estas speciale konstruita por la Esperantistaro, kaj estas havebla laŭ diversaj ampleksoj, kiuj entenas de du ĝis ses valvoj. Aŭskultu ĝin en propra hejmo via !

MEMORU—POR ĈIO ELEKTRA.

Telefonu: JW 4017.

urbo, vespere akompanis ŝin por rigardi belan japanan dancon kaj multe amuzis ŝin. En Tokio s-roj Okamoto kaj Hirasaŭa vizitis ŝin kaj post kelkaj tagoj oni havis bonvenigan kunvenon por ŝi. Dume ŝi esploris la rekonstruitan modernan urbon kaj vizitis Nikko, fama pro la belega sanktejo. Ĉio estis mirinde bela por ŝi.

La 14-an de aprilo kunveno por bonvenigi f-inon Sinnotte estis okazigata samtempe kun la Zamenhofa festo en la konstruaĵo de Junulara Kristana Asocio.

Kunvenis ĉirkaŭ 60 gesamideanoj. Post la vespermanĝo f-ino Sinnotte parolis pri la impresoj, kiun ŝi ricevis en nia lando. Ŝian parolon sekvis salutoj de s-roj Aguro, Ŝimizu, Kuraĉi kaj Sasaki. Ankaŭ estis kelkaj donacoj.

Klara Rondo, rondo de Tokiaj Espistinoj, aranĝis kunvenon por la sama celo en la 13-a. Ĉeestis 16 samideaninoj, inter kiuj estis ankaŭ f-inoj Alexander kaj Casy. Kiel memoraĵon, oni donacis al la gastino folion, sur kiun ĉiuj subskribis. Ankaŭ 7-jara filineto de s-ino Sasaki lerte subskribis.

Ŝi adiaŭis nian landon la 17-an. Ŝia restado estis mallonga, sed ŝi havis multajn okazojn vidi japanajn gesamideanojn kaj ĉefajn famlokojn. Se ŝi ne apartenus al nia anaro, estus certe, ke ŝi ne ricevus tiun ĝojon, kiun nur Esp-istoj sentas.

Baldaŭ ŝi rehejmiĝos kun diversaj memoraĵoj; ĉiujfoje kiam ŝi vidos ilin, ili refreŝigos al ŝi la memoron kaj invitos ŝin al refoja vizito. Ni esperas, ke la revizito, kiun ŝi promesis al ni, nepre efektiviĝos.

(El "Orienta Revuo.")

PLEZURIGE

estas, anonci ke s-roj J. Lauder, Georgo Day, kaj E. Clark, ĉiu de Aucklando, N.Z., kaj s-ro A. Dewar, ĉe Masterton, N.Z., sukcesis ĉe la B.E.A. diploma ekzameno. Plej grave kaj kontentige estas, ke ĉe el la novaj diplomitoj estas aktive laboranta Esperantisto, estante oficisto en la klubo sialoka.

NEKROLOGO.

(Kav. J. G. Ward, P.C., C.C.M.G.)

Kiam la veterana Novzelanda ŝtatisto

kaj dufoja ĉefministro, Kavaliro Jozefo G. Ward, trankvile kaj pace forpasis de tiu ĉi mondo en frumatena horo la 8an de Julio, tiam la Novzelanda Esperanto Asocio bedaŭrinde perdis unu el siaj altrangaj patronoj, kaj la Esperantistoj adiaŭis helpeman amikon.

Kvankam la mortinta ĉefministro ne scipovis Esperanton, li estis tre simpatia al la lingvo internacia dum multaj jaroj, akceptinte la patronecon de la antaŭa Novzelanda Asocio, fondita en 1904, kiun oficon li plenumis ĝis la Asocio ekdormis dek jaroj poste. Pro sia elhora amikeco al Esperanto, Kavaliro Jozefo Ward estis unuvoĉe elektita, kiel patrono de l' nuna NZEA ĉe la nacia kunveno de Esp-istoj okazigita ĉe Wellington en Januaro, 1929a. Li akceptis grandaplezure; kaj per sia okupo de alta oficiala posteno kaj per sia reputacio kiel sperta kaj saĝa ŝtatisto, li faciligis la laboron de samideanoj establi kaj popularigi Esperanton inter la Novzelandaj publikoj.

En la nomo de sia agkomitato kaj membroj, la NZEA kuŝigis sur la ĉerkon, dum tiu restis ĉe Parlamenta Domo, belan girlandon, kiel esprimon de kondolenco kaj respekto por la mortinta patrono. Restu li pace.

KRONIKO.

Brisbano:—La 27 majo la societo bonvenigis sinjoron F. Simon, el Sidnejo, kiu de nun loĝos inter ni. En la nomo de la societanoj, la prezidanto (sinjoro Hyde) esprimis la grandan ĝojon, kiun ili sentas, havante inter si tiel fervoran batalanton por nia movado, kaj la esperon, ke sinjoro Simon trovos agrabla sian restadon en Brisbano kaj partoprenos kun siaj kutimaj sindono kaj vigleco nian movadon ĉitien.

Sinjoro Simon dankis por la akcepto, kaj parolis pri la urĝa bezono restarigi la Aŭstralazian Esperanto-Asociacion, por ke la Aŭstralio kaj Nov-Zelanda samideanaro povu en gravaj aferoj agi unuope kaj paroli per unu voĉo. La ĉeestantoj aŭskultis kun vigla atento.

La 22 junio la societanoj havis kampfeston en Ashgrove. Pro pluvo tamen la anoj disiris kaj poste rekonvenis en la hejmo de nia samideano sinjoro N.

HAROLD PUDNEY

Kial fuŝe skribaĉi per kripla fontanplumo? Vi povas denove senti tiun plezuron, kiun donas facile funkcia fontanplumo, se vi alportas ĝin al H. Pudney, multjara spertiginto, kiu lerte riparos ĝin je malalta kosto ĝis re-

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

Specialisto pri Fontanplumoj

noveco.

Ĉu nova fontanplumo kiel donaco, aŭ por vi mem? El ĉiu speco ili kuŝas ĉe li je facilaj prezoj. Aparta atento donata al poŝt-mendoj

Notu adreson:—

G. Mills, en Moorooka, kie oni finis agrablan tagon.

La 24 junio la societo konsideris la proponon de la Sidneja societo pri restarigo de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio laŭ la projekto prezentita de ties sekretario (sinjoro Pfahl), pri kio la anoj montris intereson sed ne entuziasmon.

Melbourne, Victoria.—La jarkunveno de la Melb. Esperanto Societo okazis frue en julio, kiam jenaj ge-sroj reaktceptis oficon:—Prez. s-ro P. Hudson; vic-prez-oj, f-ino L. Irwin kaj s-ro P. Holmes; sekretario, f-ino V. Cox; kasisto, s-ro E. Cox; bibliotekisto, s-ro S. Bishop.

La monata dancfestoj, tre ĝuata, okazis la 7an de julio. Verda-j steloj brile sidis sur ĉies brusto, kaj premion gajnis la tenanto de bonŝanca stelo.

S-ro Hudson ankoraŭ rakontis pri sia vojaĝo en Burmo. Suririnte riverboaton ĉe Mandalay, li veturis sur rivero Irawadi ĝis Bhamo. La rivero fluas tre rapide, do la veturo okupis tri tagojn. Ambaŭborde de la rivero mallume etendiĝas densejo. Post du tagoj li revenis al Mandalay, tie restis 5 tagojn kaj faris multe da ekskursoj ĉirkaŭaĵe. Sep mil pastroj servas en la granda templo tiu-urba, kaj dum deĵorado forrazas la hararon kaj portas flavajn robojn. Krom servi entemple, ili ankaŭ instruadas. Kutime la pastroj dediĉas ne la tutan vivon al templa servado, sed laŭ arango faras tion por 4-5 aŭ pli jaroj. Post la difinita tempo ili liberigas el tiu deĵordevo kaj rajtas labori je la komerco aŭ alia okupo. Por atingi la supron de Mandalay Hill oni devas grimpi 999 ŝtupojn, sed rekomence por tio oni vidas belan okulĉarmilon de la urbo kaj 700 temploj. De Mandalay s-ro Hudson iris al Prome, apud rivero Irawadi.

Sidnejo.—La 10a de julio s-ro I. Serišev alparolis la klubanojn pri la "Granda Iluzio de Homoj de la Kosmo." La 17an d-ro F. Williams, nia eksprez., vizitis la klubon, kio ĝojigis la koron de ĉiu ano. Li parolis pri sia vivo kaj laboro en Papua, kien li intencas reiri kun la familio post mallonga libertempo en Melbourne. La 26an okazis la monata danco kluba, kaj la 2an de sept-o oni prezentos la jaran Balon de la Ligo de Nacioj en Sidnejo. Tiu ĉi estas vere internacia balo, ĉar ĉiuj konsuloj, (proks. 54) ĉeestos kun dancistaro, kaj ĉiuj nacioj promenos spektakle ĉirkaŭ la balĉambro. La Esperantistoj,

kiel kutime, ankaŭ havos parton en tio. La guberniestro de N.S.K. estas prezidanto de la afero. Lastan jaron pli ol 2000 personoj ĉeestis.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, S-ino Sainsbury, "Noeline," Carrington St., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretariino, S-ino L. Payne, 8 Bruce Strato. Kunvenas en ĉiu mardo je la 7.30a horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas la duan lundon de ĉiu monato je 7.45a horo vespere ĉe Nov-Preĝeja Halo (New Church Hall) Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell. Sekretariino: S-ino E. M. Watkin. Komunikadojn al la prezidanto ĉe Kent's Buildings, Newmarket, Auckland.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Hudson; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Room No. 3, Temperance Hall, Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro A. E. Pryke; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del: UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Berttram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.